

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Profektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburĝ
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 148b
2. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.
Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas aldona-
ata al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Impresoj.

Akcepto.

Mi estas homo, kiu rigardas la mondon nur de la plej sunbrila flanko. Kiam aliaj eble havas nur plendojn, kritikoj pri ĉio ajn, opinias ĉion abomeninda, tiam mi vidas lumradion eĉ en plej nuboplena ĉielo, trovas stelon eĉ en plej malhela nokto. Serena estas ĉiam mia animo. Mi ŝatas la idealismon, la optimismon, la ĝojon, la ĝuon, sed mi malamas la tro krudan realismon, la pesimismon, la hipohondrecon, la sindetenen de ĝojo kaj plezuro. Pro tio mi ankaŭ tiom amas niajn Mondfestojn, niajn belajn harmoniajn Universalaĵojn. Pro tio mi kompreneble ankaŭ deziregis viziti nian Dekkvinan, kvankam la nuntempa politika kaj ekonomia situacio estis ioma malagrablaĵo.

Nürnberg! Ni alvenis en la stacidomo. Laŭ la diro de kelkaj kunvojaĝintoj precipe la lasta parto de la vojaĝo estis trege malkomforta, sed mi tute ne povis plendi: mi havis bonan starlokon inter amaso da kofroj kaj homoj kaj povis trans la kapoj de miaj antaŭstarantoj rigardi tra la fenestro al belaj pejzaĝoj; mi nur ne povis moviĝi, nek dekstren, nek maldekstren, nek antaŭen, nek malantaŭen; sed tio ne estis grava.

Do, mi bone alvenis Nürnbergon. Ĉe la elirejo el la stacia tunelo mi trovis ornamitan standardon kun bonveniga teksto kaj montrilon al la Akceptejo. Kelkaj kunvojaĝintoj plendis, ke ne estas samideanoj en la stacidomo por persone akcepti kaj gvidi ilin. Sed mi estis tute kontenta. Mi tuj trovis la Akceptejon rekte apud la stacidomo, nur mi devis antaŭ ĝi atendi kelkan tempon, ĉar alvenis amasego da kongresanoj per sama ŝarĝo. Kelkaj denove plendis; mi ne scias kial. Ĉu tio ne jam estis bona okazo por retrovi iamajn konatojn aŭ por amikiĝi kun ankoraŭ ne konataj samideanoj? Fine mi sukcesis eniri la plenplenan Akceptejon, kie fervoraj helpemuloj klopodis laŭeble servi la amason de la alvenintoj.

En apuda salono oni povis informiĝi pri diversaj aferoj, ekz. kie troviĝas la Kongresejo, loĝejo ktp. Ĉetero ĉiu kongresano ricevis belan kongreslibron kaj bonan urboplanon. Do ĉia kaziĝo por estis ĝoja kaj kontenta.

Kongresejo.

La vojo de la stacidomo al la Kongresejo estas mallonga. Dekope, centope ni iris laŭlonge de la antikva urbmuro, sur larĝa bulvaroj, preter modernaj hoteloj kaj privataj domoj. Jen maldekstre la grandioza teatro, jen dekstre la ejo de la fak-kunsidoj, jen denove maldekstre fiera palaco ornamita per flagoj kaj girlandoj: la Kongresejo. Dumvoje mi aŭdis denove kelkajn plendojn, pri pluvo, froa vento kaj entute netaŭga vetero. Sed ĉu la L.K.K. povis etendiĝi pluvombreleĝon super la tuta urbo? Ankaŭ mi iom malsekiĝis; sed atinginte la Kongresejon, mi ja estis savita. Ĉetero, survoje al la Kongresejo renkonte venis al mi tiom da kongresanoj jam pli frue alvenintaj en la urbo, ili aliris min tiom afable, precipe la fratinoj (sic! Red.); ili vokis al mi tiom sinceran "Saluton, samideano!" ke mia koro pli rapide batis, kaj senfine kreskis mia ĝojo kaj kontento.

Grandioza palaco, la Kongresejo! Vera labirinto. Kaj en ĝi iradis, interpuŝadis, svarmadis tiom da homoj, kvazaŭ la domo estus giganta formikejo. Komence mi estis iom embarasita pro tia eksterordinara trafiko, sed baldaŭ mi kutimiĝis, fordonis miajn vestaĵojn kaj mian valizon en la vestogardejon kaj ektramiĝis la labirinton.

Unue mi trafis en la vendejon de E. T. Ĝus estis pretaj la unuaj ekzempleroj de la 1-a Kongresa Numero. Mi aĉetis unu. La prezo de duona peco ja ebligas al ĉiuj provizi sin per la valora kongresmaterialo. Ĉi tie ankaŭ la vendejo de "Lit. Mondo", apude tiuj de Hirt kaj Ellersiek kaj la vendejo de la Kongreso mem.

Mi paŝas supren, kelkfoje haltigite de geamikoj el antaŭaj jaroj, atingas la grandan salonegon, belege ornamitan kaj lumigitan, kie jam estas okupitaj ĉiuj sidlokoj; sur la scenejo koncertas granda blvmuzika orkestro. Apude troviĝas la redakciejo de E. T. kaj la monŝangejo.

La Profektanto de la XV-a.



FRITZ EBERT
Prezidanto de la Germana Respubliko



Štasekretario Schulz
Eminenta favoranto de la ideo de internacia lingvo.

En alia parto de la "Labirinto" mi trovis babil-ejon, poŝtejon kaj la oficejon de la L. K. K.

Ĉio ŝajne estis en bona ordo, almenaŭ al mi tio ŝajnis. Entute mi estis en plej serena humoro, mi plue vagadis en la labirinto, rigardante, admirante, salutante, parolante nian "karan lingvon" — mallonge, mi estis kontenta je ĉio, escepte je tio, ke — je la 12-a horo — oni fermis la lokon de mia plezuro. Nu, ne damaĝe! Morgaŭ, post freŝiga dormo, ni denove kunvenos tie. Onklo Serena.

La Malferma Kunsido.

Hodiaŭ matene je 11.15 h. okazis sub prezido s.-ov. Frenckell, finlanda ĝen.-konsulo en Dresden, la Malferma Kunsido de la XV-a en la plenplena, bele ornamita festosalono de la Kongresejo per kantado de la himno „Espero“ akompanata per orgenludo. Reprezentitaj estis i.a. s-o ŝtatekretario Schulz kiel reprezentanto de la Regna Prezidanto kaj de la Regna Ministerio por Interno, kaj la ĉefurbestro de Nürnberg s-o D-ro Luppe.

Poŝt saluto de la prez. s-o v. Frenckell oni elektas per aklamado la Estraron de la Kongreso. Prezidanto: Prof. D-ro Dietterle, direktoro de la Esp. Instituto de la Germana Respubliko. Sekretarioj: s-oj Hans Jakob, Andree Cseh kaj Petzold. Viceprezidantoj: Prof. D-ro Ledermann; la reprezentantoj de

jenaj landoj: Aŭstrio (s-o Schade), Anglujo (Ysac), Bulgarujo (Georgiev), Ĉeĥoslovakio (Kamaryt), Danujo (Blicher), Estonio (Vaher), Finnlando (Atilla), Germanujo (D-ro Steche), Hungarujo (Prelado D-ro Giesswein), Italujo (i-ino Asquini), Jugoslavio (D-ro Maruzzi), Litovio (Ruokis), Nederlando (Isbrücker), Polujo (Eszigman), Rumanujo (D-ro Fischer), Svedujo (Nylén), Transmaraj Landoj kolektive (Drummond); la 1-a prezidanto de U.E.A. s-o Stettler kaj la sekretario de la XV-a s-o Hönigsberger.

La Prezidanto D-ro Dietterle dankas pro la elektoj, atentigas ke la XV-a estas jam la dua Universala Kongreso en Germanujo, memorigas pri la jam ne vivantaj samideanoj, precipe nia majstro mem, salutas, aplaŭdegate, s-inon Zamenhof, kaj fine transdonas la parolon al la reprezentanto de la Prezidanto de la Germana Respubliko, kiu bonvolis akcepti la Honoran Protekton de la XV-a, s-o ŝtatekretario Schulz. Lian paroladon ni impresos en la morgaŭa numero.

La Prezidanto respondas germane kaj Esperante, dankas al la antaŭa parolinto kaj petas la Kongreson esprimi telegrafe sian dankon al la Prezidanto de la Germ. Respubliko s-o Ebert kaj al la Ministro por Interno s-o Oeser.

Nun prenas la parolon la ĉefurbestro de Nürnberg s-o D-ro Luppe. Ankaŭ lian paroladon, kiun li diris en bonega Esperanto, ni povos publikigi nur morgaŭ.

Post tio s-o Prof. Ledermann, prez. de la L. K. K., atentigas pri la senekzempla, fieriga sukceso de la Kongreso, kiu aŭskultigos la mondon por ĝiaj preskaŭ 5000 alĝintoj el 43 landoj. Li dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis en la sukcesigo de la Kongreso, precipe al la urbaj aŭtoritatoj, la registaro, la venintoj kaj ankaŭ al tiuj, kiuj ne povas ĉeesti persone, sed tamen ĉeestas spirite.

Sekvas la ĉefa oratoro de ĉiuj niaj kongresoj D-ro Privat, Vicprez. de U.E.A. Li dankas al L. K. K., al la oficialaj reprezentantoj ktp. kaj elokvente paroladas precipe pri la ideala flanko, la t. n. Interna Ideo, de nia movado.

Aludante al karakterizaĵo de Nürnberg, la fame konataj ludiloj, li klarigas, ke Nürnberg estas historia urbo ne nur de la monda historio, sed ankaŭ de la Esperanta. Kiel en junio la infanoj estas atentigitaj pri Nürnberg per la ludiloj, nun la Esperantistoj koncentrigas sian rigardon al Nürnberg — la ĉifara centropunkto de la Esperantaj okazantaĵoj, kie oni ne ludas, sed laboras serioze.

Lin dankas la Prezidanto D-ro Dietterle, dirante ke ĝenerale publika afero estas publika afero, kaj privata afero estas privata afero, sed ke (ho paradokso!) en Esperantujo Privat'aj aferoj estas preskaŭ ĉiam publikaj aferoj, kaj publikaj aferoj estas preskaŭ ĉiam Privat'aj aferoj. Li diras, ke la parolado de Privat estas la kulminacia punkto de ĉiu kongreso.

Nun salutas la Kongreson la oficialaj reprezentantoj de eksterlandaj registaroj kaj ministerioj. Parolas por Ĉeĥoslovakio Prof. Stejskal (Ĉsl. Registaro), Finnlando s-o Jalava (Finlanda Registaro, precipe Instrua Min.), Jugoslavio s-o Klajić (Financa Min.), Litovio s-o Ruokis (Instrua Min.), Nederlando s-o Isbrücker (Min. de Instruado, Art kaj Sciencoj), Italujo s-o Kav. Vaona (Itala Ministraro), Rumanujo s-o Fischer (Min. por Komerco kaj Industrio).

Al la longa vico de naciaj reprezentantoj sekvis mallongaj salutparoloj de reprezentantoj de internaciaj institucioj. Komisiite s-o Rudolf Horner salutis en la nomo de la Ruĝa Kruco, Genevo, poste de reprezentanto de la Blindula Kongreso kaj de la Internacia Ligo por Paco kaj Libereco. En la nomo de la Internaciaj Foiroj de Frankfurt a. M. parolis s-o redaktoro Rob. Kreuz, kiu samtempe ankaŭ salutis en sia rolo kiel sekretario en la nomo de la Interfoira Komisiono, Leipzig. Pluraj reprezentantoj bedaŭrinde ne plu povis paroli, ĉar estis jam tro malfre. La prezidanto petis, ke tiuj personoj parolu en la laborkunsidoj.

Je la fino rimarkigante, ke la kunsidoj komenciĝos precize je la fiksita komenco hora, kaj humore plene aldonante, ke li komencus la kunsidon, eĉ se nur unu sola persono ĉeestus je akurata tempo, la kunsido estas fermita je la 1.45 h.

